

32-a Jarkolekto * Decembro 2018 * N-ro 111



ALCAUDETE
kvieteco kun gusto je sukero

Gazeto Andaluza

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE

Vicente HERRERA COBO

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
Tri Esperanto-Kongresoj en Andaluzio	6
La Romia Urbo Italiko en Andaluzio	20
Lingva Angulo: La verbo <i>Scii</i>	26
Turismi en <i>Alcaudete</i>	30
Paĝoj pri nia historio.....	34
Andaluza Kuirarto	39
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio.....	41
Krucvortenigmo kaj Rebuso.....	43
Humuro	46

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



➤ Esperanto en la Sevila Universitato

Dum la monato aprilo 2019-a, okazis en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Sevilo du prelegoj pri la internacia lingvo. Tiu unua okazis la 12-a de aprilo, prelegita de la profesoro Vicente Manzano-Arrondo, de la Universitato de Sevilo, pri la temo *“Esperanto: más que un idioma internacional ¡Hablemos! (Esperanto: pli ol internacia lingvo, ni parolu!)*. La dua prelego, de la profesorino Ilona Koutny, de la Universitato Adam Mickiewicz de Poznano (Pollando), okazanta la 26-a de aprilo, temis pri la temo *“Cómo el esperanto salió del tubo de ensayo y por qué es un buen instrumento para la comunicación internacional”* (Kiel esperanto eliris el provo-tubo kaj kial ĝi estas taŭga instrumento por la internacia komunikado).



Prof. Vicente Manzano prelegas en la Universitato de Sevilo

➤ Vizito de usona esperantisto

Orlando RAOLA, usona kub-devena esperantisto, akompanita de familianoj vizitis Andaluzion la pasintan monaton julion. Orlando estas universitata profesoro pri Kemio kaj post la lasta Universala Kongreso de Esperanto, li estas membro de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio.

La familio RAOLA alteriĝis en Granadon kaj tie ili vizitis la urbon kaj Alpuharojn. Poste, ili veturis en Jaenon kaj fine ili atingis Kordovon. Okaze de restado en ĉi tiu urbo Guillermo Molleda kaj José María Rodríguez, kordovaj samideanoj, akompanis ilin dum vizito al la ĉefaj monumentoj de la urbo.



Guillermo Molleda, familio RAOLA kaj J.M. Rodríguez antaŭ la araba murego en Kordovo, la pasintan 1-an de julio

➤ Eldonado de novaj publikigaĵoj

Kiel jam okazas de antaŭ kelkaj jaroj, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunlaboris en la eldonado de fakaj revuoj, kunlabore kun aliaj asocioj. Tiel, dum la lasta Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Lahti (Finnlando), IJEA – la jurista faka organizo de la E-movado- prezentis la 18-an numero de *Jura Tribuno Internacia*, kun-eldonita de IJEA kaj Andaluzia E-Unuiĝo. Ĉi tiun revuon ricevas ĉiuj esperantistoj kiuj laboras en juraj medioj kaj ene de ĝiaj sepdeko da paĝoj aperas artikoloj pri Eŭropa Unio kaj la Klimat-ŝanĝo; pri la islama jura institucio *kafalo* kaj mallongaj informoj pri labora, internaciaj kaj lingva jur-aferoj. Ankaŭ oni devas elstari specialan branĉon dediĉita al la filmoj kiuj pritraktas jurajn aferojn.

Ankaŭ aperis la pasintan monaton julion la revuo *VENTO*, kiu eblas legi ĉe interreto, do ne ekzistas papera versio. La revuo pritraktas temojn rilataj al flago-scienco (veksilologio). Ĝi estas la plej nova faka publikigaĵo en la E-movado. Ĝi estas libere legebla ĉe www.esperanto.ac/vento



TRI ESPERANTO-KONGRESOJ EN ANDALUZIO

La okazigo de internacia E-kongreso ĉi tie, en Andaluzio, estis projekto delonge revata. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jam posedis la sperton organizi naciajn kongresojn, ĉu hispanaj ĉu andaluziaj kaj eĉ kunaj, tamen, al ni mankis la efektivigo de internacia renkontiĝo kaj estas necese agnoski, ke nur okaze de tiaj kunvenoj la lingvo esperanto verdire pravas sian taŭgecon kiel internacian komunikilon.



Pro tio, pasintjare, ni akceptis la proponon de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio organizi ĝian jaran kongreson en la urbo Malago. Kompreneble AEU aŭtomate invitis al Hispana Esperanto-Federacio okazigi la Hispanan Kongreson en ĉi tiu andaluzia urbo kaj ambaŭ kongresoj koincidus kun la ĉi-jara Andaluzia Kongreso de Esperanto. Do, tri esperanto-renkontiĝoj povus okazi en Malago, pro tio, ni decidis nomigi ĉi tiun projekton *La Triopa Kongreso*, ĉar dum ĝi okazus andaluzia + hispana + fervojistaj kongresoj.

La pripensita dato estis la unuaj tagoj de la monato majo kaj pro la fakto, ke multaj homoj vojaĝas eksterlanden nur kiam la renkontiĝo estas sufiĉe longa se paroli pri tagoj kaj abunda je agadoj, ni proponis kongreson de la 3-a ĝis la 9-a de majo kun tre allogaj antaŭaj kaj postaj ekskursoj.

La unuaj partoprenantoj alvenis en Malagon la 1-an de majo. Jam ĉi-tage oni organizis mallongan viziton al la urbo. Ĵaŭde la 2-an de majo okazis ekskurso al Granado, partoprenis ĉefe fervojistaj kongresanoj kaj ankaŭ kelkaj hispanoj kiuj deziris viziti aŭ reviziti la urbon. Bedaŭrinde, pro problemoj de la turisma agentejo ne estis eble viziti la famegan Alhambron, malgraŭ tio partoprenindaj estis la vizitoj al la ĝardenoj de Generalifo, tuj apud la Alhambro, kaj al la Katedralo, kun speciala vizito al la Reĝa Kapelo, ĉi tiu estas la dua plej vizitata monumento de la urbo post la “*Ruĝa Fortreso*” (Alhambro). Akompanis kaj gvidis la vizitantojn Jordi LIETOR, turisma gvidisto kaj estrarano de AEU.

Por tiuj kiuj ne ekskursis en Granadon okazis programeroj en la alloga kongresejo. Dennis KEEFE, de Usono, parolis pri “Esperantistiĝo disvolviĝe: ekkono, motivoj, bariloj”. Nia usona samideano sciigis la ĉefajn kialojn kaj problemojn rilate la partoprenon de novaj esperanto-parolantoj en la movado.



Dennis Keefe dum la prelego

Kadre de la Andaluzia Kongreso Juan GARCÍA DEL RÍO, de Malago, prelegis pri la temo “Malago kiel pionira urbo en Esperantujo”. Oni devas memori, ke en ĉi tiu urbo fondiĝis la unua esperanto-klubo en Hispanio, la kvina en la mondo, en la jaro 1890, dank’al la streboj de José Rodríguez Huertas, eks-volapukisto, kiu post

koni la novan lingvon proponita de D-ro Zamenhof ne dubis diskonigi ĝin en Malago pere de modesta sed efika publikigaĵo, malgraŭ la fakto, ke Zamenhof mem rifuzis kelkajn gramatikajn aspektojn de la libreto eldonita de Rodríguez Huertas.



Blas Infante kaj Esperanto estis la celo de prelego dum la ĉi-jara Andaluzia Kongreso

Poste, José María RODRÍGUEZ parolis pri Blas Infante kaj liaj rilatoj kun la Esperanto-movado. Sciate, ke Blas Infante, la patro de la andaluzisma movado, lernis esperanton kaj li eĉ aliĝis al Universala Esperanto-Asocio. Jam okaze de aliaj andaluziaj kongresoj, Juan de Dios MONTOTO de Sevilo, prelegis pri li. Nun, José María RODRÍGUEZ, nia kordova samideano, prezentis alian vidpunkton pri kiamaniere, kial kaj kiam Blas Infante lernis la

internacian lingvon. La preleganto ankaŭ prezentis la kajereton pere de kiuj Blas Infante solvis la ekzercojn proponitajn en la libro-metodo per kiu la patro de la andaluzisma movado lernis la lingvon komence de la 2-a jardeko de la pasinta jarcento, kiuj estis akiritaj de nia asocio.

La ĉef-temo de la Kongresoj.-

La ĉef-temo de la triopa kongreso estis la pristudo de la lingva situacio en Eŭropa Unio. Temis pri alloga temo ĝuste nun, kiam oni debatas ĉu finfine Britio forlasos Eŭropan Union kaj do, eble, la rolo ludita de la angla lingvo en la eŭropa komunumo ŝanĝiĝos. Pro tio, la organizantoj de la kongresoj invitis elstarajn prelegantojn por debati pri ĉi tiu temo.

José María RODRÍGUEZ, de Hispanio, parolis pri la proponoj enkonduki Esperanton ene de la Eŭropa Unio, kiel lingvo por la administracio. Nia kordova samideano prezentis historian skizon pri la oficialaj lingvoj en Eŭropa Unio, komence nur kvar kaj nuntempe dudek kvar, ankaŭ li sciigis pri la proponoj oficialigi Esperanton, afero defendita dum la unuaj jaroj de la Eŭropaj Komunumoj kaj nuntempe dank'al la ekzisto de partio kiu celas specife por tio. Verdire temas pri "preskaŭ ne-ebla" celo, tamen li sciigis, ke la ĉefa vojo, se tiu estas nia celo, devus esti enirigi esperanton en la Eŭropan Parlamenton, ĉar ĉi tiu instanco estas la sola kie efektive ekzistas 24 oficialaj lingvoj kaj ĉiuj ili estas sam-rangaj, ene de ĉi tiu eŭropa instanco eĉ oni povas uzi aliajn ne-oficialajn lingvojn, kaj jen la plej taŭga enir-pordo por esperanto en Eŭropo.

La vespero finiĝis per la arta folkloro prezento "Arta kaj Andaluzia Etoso" de nia malaga amiko Pedro Carrillo.

Vendrede la 3-an de majo matene, Federico GOBBO, de Italio, prelegis pri la rolo de la angla lingvo en la Eŭropa Unio post la ebla *briteliro*, ĉi tiu vorto estas la plej uzata por la angla esprimo "*brexit*". GOBBO estas katedratiisto de Esperanto kaj Interlingvistiko en la Universitato de Amsterdamo (Nederlando). Li prezentis skizon pri la rolo de la ĉefaj lingvoj en la Eŭropa Unio kaj rilate la anglan li dubis pri la forlaso de la angla lingvo en la Eŭropa Unio post la ebla *briteliro*. Male, li eĉ prognozis, ke la rolo de ĉi tiu lingvo eĉ povus esti pli grava ol nun, pro la fakto, ke se fine Britio forlasas Eŭropan Union, la angla lingvo apartenus reale al neniu ŝtato, do ĝi povus esti tiel neŭtrala en Eŭropa Unio kiel esperanto mem.

Poste, Antonio Fabián JIMÉNEZ, profesoro en mez-lernejo de la malaga provinco, prezentis sian sperton en la projekto "Esperanto-Komuniko" kadre de la programo Erasmus +, aŭspiciita de Eŭropa Unio. Nia juna malaga samideano sciigis pri sia persona sperto rilate la enirigon de la instruado de la internacia lingvo en sian gimnazion, por gejunuloj inter 12 kaj 16 jaroj. Li parolis pri la partopreno en rapida kurso de kelkaj gelnantoj kaj eĉ de aliaj profesoroj kaj kiel li realigis

projekton por ebligi la vojaĝon de la partoprenantoj en la kurso por viziti aliajn lernejojn en Eŭropo kie ankaŭ okazas E-instruado kaj ĉi ĉio subvenciita de Eŭropa Unio.



A. Fabián JIMÉNEZ prezentas sian projekton
“Esperanto-Komuniko” okazigita en sia mezlernejo.

Antaŭ la tagmezo vendrede okazis nova prelego pri la lingva situacio en Eŭropa Unio. Tiam Katalin KOVATS, hungara profesorino, parolis pri kiuj fremd-lingvoj oni instruas en Eŭropa Unio, ŝi montris ekzemple sian propran familion, kiu pro la internacieco de la familianoj, la rego de multaj lingvoj estas eĉ normala afero.

La mateno finiĝis per komuna rinda tablo inter Katalin KOVATIS, Federico GOBBO, Seán O’RIAIN kaj José María RODRÍGUEZ kiuj debatis kun la aktiva partopreno de la ĉeestanta publiko pri la lingva situacio en Eŭropa Unio kaj la ebla rolo de esperanto ene de ĝi.

La *triopa kongreso* estis alloga miksaĵo inter ekskursoj kaj prelegoj. Tiel, vendrede grupeto de kongresanoj promenadis tra la urbo Malago gvidita de malaga samideano, por koni pli detale la urbon piedire kaj per urba buso. En la kongresejo Dámaso SUÁREZ, prezidanto de la Hispana Societo por la Defendo de la Lingvo, prelegis hispane, kun surekrana traduko en esperanton, pri la temo “Defendo de la nacia lingvo en la angle-parolanta Eŭropo”. S-ro SUÁREZ klarigis al la ĉeestantoj la movadon ekzistanta en kelkaj eŭropaj landoj, ĉefe en Francio kaj Germanio, kiu celas defendi la naciajn lingvojn en la nuntempa Eŭropo kontraŭ la ĉiopovanta angla lingvo.

Ankaŭ ege interesa estis la prelego de nia kordova samideano David GALADÍ, astrofizikisto en la granada stel-observejo, kiu parolis al ni pri speciala okazintaĵo kiun oni memoras dum la kuranta jaro 2019. Temas pri la 50-a datreveno de la unua homa vojaĝo en la Lunon.



David GALADÍ preparas sian prelegon pri
“La Homo en la Luno (50-a datreveno)”

La vendredo finiĝis per du artaj spektakloj. Unualoke ludis malaga orkestro kaj poste la fama esperantista muzik-paro *Kajto* regalis la ĉeestantojn per siaj famaj kantaĵoj.

Sabate matene okazis la oficiala malfermo de la Kongresoj. Kvanakam jam de antaŭ kelkaj tagoj la renkontiĝo funkciis, verdire oni profitis tiun tagon, kun pli amasa partopreno kaj la ĉeesto de urbaj aŭtoritatuloj, por inaŭguri la *triopan kongreson* okazanta en Malago. La Prezidantoj de Hispana Federacio kaj de Internacia Fervojista Asocio dankis al la malaga grupo kaj al la andaluzia asocio pro la laboro plenumata, la Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo bonvenigis ĉiujn partoprenantojn.

Miguel FERNÁNDEZ, granadano kaj unu el la plej prestiĝaj esperanto-verkistoj en Hispanio, prelegis aŭ pli bone dirita, deklamis pri sia liriko kaj la muziko. Okaze de siaj prelegoj Miguel FERNÁNDEZ ne nur parolas, li ankaŭ deklamas kaj kantas, ja li estas la pinto de la esperanto-literaturo en Hispanio.

Vespere, nova prelego pri la ĉef-temo de la kongresoj okazis. Séan O'RIAIN, irlanda diplomatiisto kaj Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Asocio, prelegis pri la rolo de la minoritataj lingvoj en la Eŭropa Unio. Oni devas substreki la fakton, ke EU havas entute 24 oficialajn lingvojn, kelkaj el ili ja tre malmulte uzataj, kiel la malta aŭ la irlanda lingvoj, tamen ili estas tute sam-rangaj ol la plej parolataj idiomoj, almenaŭ el la teoria vidpunkto. D-ro O'RIAIN estas konata fakulo pri la irlanda lingvo, tiel, okaze de sia prelego li profitis la okazon por paroli ankaŭ pri ĉi tiu kelta lingvo.



Okaze de la *triopa kongreso* oni dediĉis specialan atenton al la teatro kaj al la muziko. Do, post prelegoj, estis tempo por ĉeesti spektaklon reĝisorita kaj ludita de unusola aktoro, Saŝa Pilipoviĉ, kiu unue prezentis teatran skizon pri la vivo de Galileo Galilei kaj post kelkminuta ripozo li regalis la ĉeestantojn per ciganaj kantoj. La vespero finiĝis per spektaklo de Rocío Alba, malaga kantistino, kiu ludis tipajn hispanajn kantaĵojn.

Dimanĉe la 5-an de majo estis la tago kiam finiĝis la andaluza kaj hispana kongresojn kaj tiam komenciĝis la internacia fervojista renkontiĝo. Matene, Dennis KEEFE prelegis pri persona projekto instigi la lernadon de la internacia lingvo en alloga etoso. Temas pri la projekto *Esperanto-plaĝo*. Pere de ĝi, nia usona samideano, dum multaj jaroj profesoro pri merkotiko en Ĉinio, faciligas la alvenon en Hispanion de kelkaj gelernantoj, ĝis nun orientanoj, kiuj dum kelkaj monatoj enmiksiĝas en la hispanan kulturon kaj samtempe lernas esperanton.

Poste, Federico GOBBO denove prelegis, ĉi-foje li diskonigis la ekziston kaj prezentis la agadon de la Katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko en la Universitato de Amsterdamo (Nederlando), kiun li regas. Vere la ekzisto de ĉi tiu branĉo en prestiĝa universitato estas bona rimedo por seriozigi la lernadon de la internacia lingvo.



Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio S-ro José Antonio del Barrio havigas donacon al D-ro Federico Gobbo, okaze de lia prelego.

Dimanĉe vespere okazis la unuaj programeroj de la fervojista kongreso. La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio estas unu el la plej prestiĝaj kaj aktivaj fakaj asocioj en Esperantio, tiel dum la ĉi-jara

kongreso en Malaga oni pripensis la okazigon de prelegoj pri fervojaj aferoj kaj ankaŭ la organizadon de ekskursoj al vidindaj lokoj.

La unua preleganto pri fervojaj temoj estis José María RODRÍGUEZ, kiu parolis pri la konstruo kaj funkciigo de rapida trajno en Saŭd-Arabio fare de hispanaj entreprenoj. Li sciigis, ke ĉi-jare tiu rapida trajno, vojaĝanta el Medino en Mekkon, ekfunkcios kaj ĝi ebligos la transporton de milionoj da pilgrimantoj en la sanktan urbon de la islama religio okaze de la *haĝo*, unu el la kolonoj de la islama fido, tio estas: la deviga pilgrimado en Mekkon kiu ĉiu islamano devas plenumi almenaŭ unu fojon en sia vivo.



Prelego dum la Fervojista Kongreso

Post ĉi tiu prelego S-ro Miguel Antonio ROS LOURENÇO, membro de la Malaga Asocio de Amikoj de la Fervojoj, prezentis skizon pri la historio de la fervojaj linioj de Malago, kiuj ekfunkciis dum la 19.a jarcento, ĉefe kun la celo transporti mineralojn ĉar dum tiuj jaroj ekzistis en Malago grava siderurgia industrio.

Sekvis prezentoj pri aliaj temoj, konkrete pri instruado de esperanto en la universitatoj fare de Ilona KOUTNY kaj pri la ellaboro de vikipediaj paĝoj de Laurent VIGNAUD.

Vere amuza kaj simpatia estis la aŭkcio regita de Katalin Kovats, Ilona Koutny kaj José Antonio del Barrio, tiam oni proponis por aĉetado malnovajn librojn kaj esperantaĵojn, por kiuj la ĉeestantoj ofertis monon. Tiel, estis eble aĉeti antikvajn revuojn, esperantomonerojn, muzikaj Ko-Dojn kaj filatelajojn.



José Antonio del Barrio, Iлона Koutny kaj Katalin Kovats prezentas kaj ofertas esperantaĵojn al la ĉeestantoj dum la aŭkcio.

La dimanĉo finiĝis per la senduba plej sukcesa programero de la hispanaj kongresoj de Esperanto, tio estas *Vivu la Teatro*, gvidata de Miguel FERNÁNDEZ kaj Ana MANERO. Dum ĝi nombraj partoprenantoj deklamas poeziojn, kantas kaj ludas teatretojn kun la celo pruvi, ke la internacia lingvo ankaŭ estas kultura esprimilo.

Lunde estis tempo denove ekskursi. La organizantoj pripensis kelkajn ekskursojn kiuj rilatas al fervojoj, la unua irigis la gepartoprenantojn al *Zafarraya* (prononcu “zafaraja”), malgranda malaga vilaĝeto tamen tre grava en la fervojaj linioj en la komenco de la 20-jarcento, tie eĉ ekzistas ankoraŭ malgranda vagonaro kiu trapasas la vilaĝon, kompreneble la esperantistaro uzis ĝin kaj ili vivis tre amuzajn momentojn.



Vagonareto en *Zafarraya*

Kompreneble ankaŭ dum tiu tago okazis kulturaj programeroj, tiel dum-vespere la esperanto-paro *Kajto* ludis sian spektaklon: “*Kajto muzikas*”.

Mardon la 7-an estis la lasta tago en la kongresejo. La tago estis plena je agadoj. Matene José María RODRÍGUEZ denove prelegis pri fervojaj temoj, ĉi-foje pri la projekto *Hyperloop*, konsiderata kiel la morgaŭa fervojo. Malago kaj ĝenerale Andaluzio ĉefrolas en ĉi tiu internacia projekto, pro la fakto, ke en la kadiza vilaĝo *El Puerto de Santa María* oni konstruas jam la unuajn vagonojn de ĉi tiu rapidega kaj preskaŭ scienc-fikcia trajno. Krome, en la malaga vilaĝo Bobadilla oni starigos specialan konstruaĵon kie efektigos la unuajn pruvojn de *hyperloop* en Hispanio.

Post ĉi tiu prelego Carlos SPINOLA parolis pri veturado tra la interplaneda spaco.



Carlos SPINOLA, unu el la ĉefaj organizantoj de la Kongreso

Poste, Ralf FRÖHLICH prelegis pri esperanta stacio kaj la mateno finiĝis per komuna parolado pri la fervojista internacia movado en Esperantio, kiu ĉi-jare atingas sian 110-an datrevenon.

Dum la vespero de la 7-a de majo okazis fakaj kunsidoj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kiu debatis pri la estonteca strategio de la asocio. La vespero finiĝis per arta programero de Grazia BARBONI.

Merkrede la 8-a okazis tuttaga ekskurso al unu el la plej belaj urboj en Andaluzio: *Ronda* (en esperanto *Arundo*). Bedaŭrinde la unuan projekton vojaĝi tien per trajno oni ne povis plenumi, pro la fakto ke la hispanaj fervojoj nuligis la linion Malago-Arundo pro teknikaj problemoj antaŭ kelkaj monatoj. Tamen, la organizantoj de la Kongreso konsideris, ke Arundo estas vizitinda urbo kaj ĝi realiĝis. La partoprenantoj konis kaj promenadis tra tiu belega urbo kun la lerta gvidado de arunda esperantistino Fátima JIMÉNEZ GARCÍA, kiu dum la kongreso ankaŭ gvidis la elementan kurson de tiuj ĉeestantoj kiuj eklernis la lingvon.

Dum la vespero, kaj jam denove en la kongresejo okazis la estrar-kunsido de la Fervojistaj Federacio.

Ĵaŭde la 9-an de majo estis la tempo viziti la urbon Kordovon. Vere, Kordovo ne troviĝas tuj apud la sidejo de la Kongreso, ambaŭ urboj distancas pli ol 100 kilometroj, tamen la organizantoj de la Kongreso deziris montri al internaciaj vizitantoj la belecojn de Andaluzio, kaj inter ili la urbo Kordovo elstarigas. Dum la urbo ni havis la eblon kalkuli kun la profesia gvidado de Jordi LIETOR kiu, kune kun José María RODRÍGUEZ (esperantisto en la urbo), montris al la vizitantojn la allogaĵojn de Kordovo, ĉefe la Moskeo, la juda kvartalo kaj *Medina Azahara*. Ĉi tiuj tri lokoj estas proklamitaj de UNESKO kiel kultura heredaĵo de la Homaro.



Geesperantistoj en la araba kalifa urbo *Medina Azahara*,
kultura heredaĵo de la Homaro

Verdire la Triopa Kongreso jam povis finiĝi, la prelegoj abundis, la kulturaj programeroj allogis kaj la ekskursoj ebligis koni vizitindajn lokojn, tamen la organizantoj deziris meti specialan finan punkton kaj tiel vendrede, sabate kaj dimanĉe oni planis realigi turisman viziton al Maroko. Fervojistoj estas vojaĝemaj homoj kaj sendube koni tiom da lokoj en Andaluzio kaj eĉ en la nordo de Afriko estis alloga kialo por partopreni en la kongreso de Malago.



Gepartoprenantoj en la ekskurso al Maroko dum la Fervojista Kongreso.





Aktiva libro-servo dum la Kongresoj



Elementa Kurso de Esperanto dum la Kongreso



Eblis loĝi kaj manĝi en la kongresejo mem



M.G. Adúriz pravas telefoni al Zamenhof okaze de humura sketĉo en la programero “Vivu la Teatro”



Dank'al la senlacaj streboj de Conchi kaj Mariló estis facile aliĝi al Kongreso.

LA ROMIA URBO ITALIKO EN ANDALUZIO

Troviĝas en Andaluzio la unua urbo fondita de la romianoj ekster la itala duoninsulo, temas pri la urbo *Italica*. Fine de la dua punika milito, Skipio Afrika (*Publius Cornelius Scipio Africanus*) setligis la vunditajn soldatojn en ibera vilaĝo apud la nuntempa urbo Sevilo. Apiano de Aleksandrio mencias la urbon kaj li diras, ke la enloĝantaro ĉefe divenis el la itala duoninsulo, pro tio ĝi ricevis la nomon *Italica* (Italiko).



La urbo Italiko en la Ibera Duoninsulo

Unuamomente la urbo estis alia plusa latina kolonio, tamen en la jaro 45 a.K. Julio Cezaro honorigis ĝin per la jura statuso de *municipium civium romanorum* (municipo de la urbo Romo). Tiel, li decidis premii la urbon kiu apogis lin kontraŭ Pompejo dum la tiama civila milito. La urbo ĉefe floris fine de la 1-a jarcento p.K kaj ankaŭ dum la 2-a kiam regis en Romo la imperiestroj Trajano kaj Hadriano, ambaŭ naskiĝintaj en Italiko aŭ el italika familio. Tiu fakto pravigas la senduban gravecon de tiu ekster-roma urbo. Kompreneble tiuj du imperiestroj multe favoris la urbon kiu ĝuis pligrandigon kaj ricevis ekonomiajn favorojn.

Dum la araba epoko la urbo, konata kiel *Al-Talika*, la antikvaj romiaj monumentoj utilis por konstrui aliajn kaj tiel iom-post-iome

Italiko malaperis sub la nuntempa vilaĝo *Santiponce*. La kristana konkero eĉ estis pli malfavora, tiel oni detruis parton de la antikva urbo por konstrui novan vojon al Ekstremaduro el Sevilo. Tamen dum la 19-a jarcento la hispana registaro decidis asigni ekonomian helpon por ebligi arkeologian prifoson en tiu zono kaj komence de la 20-a jarcento, ĝuste en la jaro 1912, Italiko estas agnoskita kiel Nacia Monumento kaj ekde tiam la loko estas speciale prizorgita de la kulturaj aŭtoritatoj de Hispanio kaj de la aŭtonoma registaro de Andaluzio.

Kion estas eble vidi nun en Italiko?

Sendube la amfiteatro estas la plej konata arkeologia restaĵo en Italiko. Oni starigis ĝin inter la jaroj 117 kaj 138 p.K., dum la regado de la imperiestro Hadriano. Ĝi estis unu el la plej grandaj en la tuta romia imperio. Entute 25.000 spektantoj povis ĉeesti la aŭditorion, ĝi mezuris 160 x 137 metrojn. Sub la lignka planko ekzistis foso el kie aperis gladiatoroj kaj sovaĝaj bestoj.



Amfiteatro en Italiko

Alia vizitinda loko en Italiko estas la restaĵoj de kelkaj domoj. Tiel, la plej gravaj kaj riĉaj familioj starigis tie belegajn domojn tute similaj al tiu de Romo. Tio estas, ene de ili troviĝis centra korto kaj

ĉirkaŭ ĝi starigis la familiaj ĉambroj. Tiu skemo, kiu verdire naskiĝis en la klasika Grekio, utilis poste kiel modelo por la tipaj andaluziaj domoj.

Ankoraŭ starigas kelkaj kolonoj kaj same estas eble vidi mozaikojn konstruitaj kiel planko de tiuj domoj. La bildoj aperantaj en tiuj mozaikoj donas nomojn nuntempe al tiuj domoj, tiel estas eble viziti la domon de la birdoj, de la planedoj, de Neptuno, ktp.




La teatron de Italiko oni eltrovis en la jaro 1984. Por la konstruo oni profitis monteton tuj apud la tiama rivero Betis, la nuntempa Gvadalkiviro. Oni starigis ĝin inter la 1-a jacento a.K. kaj la 1-a p.K. Ĝi utilis ĝis la 5-a jarcento, tiam la kristanigo de la Romia Imperio malhelpis la ekziston de teatraj spektakloj kaj pro tio ĉi tiu teatro suferis enterigojn pro kreskoj de la apuda rivero.



Teatro en Italiko

Kaj kio rilate al la imperiestroj kiuj naskiĝis en Italiko?

Marko Ulpio TRAJANO naskiĝis en Italiko en la jaro 53 p.K. Li estis ido de distingita familio en tiu andaluzia urbo. Jam en Romo li estis elstara militisto sub la regado de la imperiestroj Dominikiano kaj Nervo. En la jaro 97 p.K. la imperiestro Nervo enirigis lin en sian familion kaj li nomumis lin kiel ontan imperiestron.



Tiutempe la ido de la imperiestro ne anstataŭis lin aŭtomate, male la imperiestro elektis la plej taŭgan sucedanton, ofte inter la plej prestiĝaj militistoj, temis pri *optimus princeps* (taŭgaj princoj). Trajano respektis la tradician leĝaron kaj la Senaton kaj pro tio li estis tre bone konsiderata. Li plibonigis la imperian administracion, starigis multnombrajn publikajn monumentojn kaj protektis la familiojn kaj la orfojn.

Dum lia regado Romo konkeris Dacion, la nuntempan Rumanion. En la jaro 113 li atakis Babilonon kun la celo meti sub la romia regado eĉ la Persan Gulfon. Tamen li ne sukcesis, juda ribelado kaj atakoj de la partanoj devigis lin evakui Mezopotamion. Li malsaniĝis dum la reveno en Romon kaj tiam li mortis.

Kaj rilate la imperiestro Hadriano, li naskiĝis en la jaro 76 p.K. ene de aristokrata familio de la urbo Italiko. Ekde lia 8-a vivo-jaro li restis orfo kaj pro tio la imperiestro Trajano, kiu apartenis al tiu sama familio adoptis lin, li poste edziĝis al nepino de la imperiestro. Li akompanis al Trajano dum la milito en Dacio kaj poste li ricevis la nomumon kiel guberniestron en Paonio, konsulon kaj fine guberniestron en Sirio.



Post la morto de Trajano la edzino de la imperiestro asertis, ke dum liaj lastaj vivo-tagoj li nomumis lin kiel sucedanton, krome li ricevis la apogon de la hispana grupo de la Senato, jam tre forta grupo dum la regado de Trajano.

Dum lia regado kiel imperiestro li multe vojaĝis tra la imperio, li vizitis provincojn kaj fondis urbojn. Li luktis en la nordo de Britio, tie li starigis muregon kiu ankoraŭ estas nomita “Murego de Hadriano”. Li ankaŭ luktis kontraŭ la judoj.

Li reformis la pagon de la tributoj kaj favorigis la konstruon de grandaj monumentoj, kiel la amfiteatro de Nimes en Francio, la kastelo de Sankta Anĝelo en Romo kaj kelkaj pontoj super la rivero Tibero.



Amu vian landon kaj la tutan homaron: konu kaj diskonigu ties historion !

ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2020

HAZTE SOCIO DE LA *Asociación Andaluza de Esperanto*

Si desearas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, ésta es tu asociación

Para hacerte socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se deben abonar en la siguiente cuenta:

- BANKIA
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2020

Lingva Angulo

LA VERBO SCII



La ĉefa signifo de la verbo *scii* estas: “esti instruita, ekzercita, havi kapablon por io”. Ĉu ekzistas malsimiloj inter *scii* kaj *koni*. Evidente jes. *Koni* signifas memori, ke oni jam aŭdis, vidis, legis ion. *Scii*, kiel dirite, temas pri la senco esti instruita por io. La unua postulas memoran laboron, tamen *scii* bezonas intelektan laboron. Eble, en la hispana lingvo ambaŭ verboj

Saber kaj *Conocer* povas esti similaj, tamen en esperanto *scii* signifas, ke oni havas certan ideon pri io, sed *koni* montras, ke vi jam havas la sperton vidi aŭ memori ion.

Ni vidu la diferencon en kelkaj ekzemploj:

Ĉu vi konas esperanton? Jes, mi konas ĝin.

Laŭ ĉi tiu frazo mi memoras kio estas esperanto, tio estas, mi konas, ke ĝi estas internacia lingvo, tamen tute ne signifas, ke mi kapablas paroli, legi aŭ kompreni la lingvon. Mi konas nur la ekziston kaj eble la celon de la lingvo, ne plu.

Ĉu vi scias esperanton? Jes, mi scias ĝin.

Ĉi tiu frazo montras, ke mi estas kapabla regi la lingvon, kompreneble oni ne mencias ĝis kiu nivelo atingas tiu scio, tamen mi scias ion pri la lingvo. Do, la diferenco inter ambaŭ verboj povas esti komprenata laŭ ĉi tiuj difinoj: *mi konas ion*, mi havas precizan informon pri la ekzisto de io. *Mi scias ion*, mi estas instruita pri io.

Tiel, mi povas diri: *mi konas Kadizon*, tio estas: mi iam vizitis tiun urbon kaj mi memoras kiel ĝi estas aŭ mi iufoje legis pri ĝi kaj mi memoras detalojn pri tiu urbo. Tamen, kompreneble, mi ne povas diri: *mi scias Kadizon*, ĉar mi ne povas esti instruita, ekzercita aŭ kapabligita pri urbo.

Tamen, ni povas uzi la verbon *scii* laŭ la senco havi informon ke io ie ekzistas, ekzemple: *neniu scias la lokon kie kaŝiĝas la trezoro*. Ĉi tiu uzo de la verbo *scii* estas tre proksima al la verbo *koni* kaj sendube en tiaj frazoj la uzo de unu aŭ alia verbo povas esti taŭga.

Ni vidu pliajn uzojn de la verbo *scii* kaj derivitaj vortoj:

- SCIO: temas pri la amplekso de la informiĝo de homo.
Mi havas pri tiu temo eĉ minimuman scion.
“Sobre ese tema no tengo ni el más mínimo conocimiento”.
- SCIEMA: havi inklinon scii, tio estas, ke oni deziras posedi multajn sciojn. Ĉu simila al “konema”? Eble jes, tamen videblas kelkaj diferencoj, tiel, se oni parolas pri “sciema knabino”, temas pri tiu virino avida akiri instruojn pri io; tamen, “konema knabino” estas tiu virino kiu deziras akiri memoraĵojn, tio estas, ne estas necesa intelekta laboro, nur temas pri vidi, aŭdi, ricevi sensajn impresojn.
- SCIIGI: temas pri tre uzata verbo kiu similas al *informi*. Sciigi laŭlitere signifas “igi scii ion al iu”. Ekzemple:
La celo de la profesoro estas sciigi matematikon al la lernantoj.
“El objetivo del profesor es dar a conocer (hacer conocer) las matemáticas a los alumnos”.

Mi sciigas al vi, ke morgaŭ mi iros en vian urbon.

“Te informo (hago saber) que mañana iré a tu ciudad”.

- **SCIINDA:** temas pri io kiu estas sufiĉe interesa por ke ĝi estu sciata.

Esperanto estas sciinda lingvo.

“Esperanto es una lengua digna de ser sabida”.

Vidu diferencon kun la vorto *koninda*. Se oni diras, ke esperanto estas koninda lingvo, mi volas diri, ke estas interese memori, ke esperanto estas lingvo. Tamen, se mi diras, ke esperanto estas sciinda lingvo, tio signifas, ke estas interese akiri instruadon pri la lingvo.

- **ANTAŬSCII:** scii, ke io okazos, tamen tio ankoraŭ ne okazas/is.

Mi antaŭscias, ke vi havos ekonomiajn problemojn.

“Sé de antemano que tendrás problemas económicos”.

- **SCIVOLEMA:** temas pri la karatero de tiu kiu avida deziras akiri instruojn.

Mia filo estas scivolema pri astronomio.

“A mi hijo le apasiona saber de astronomía”

Tio estas, mia filo deziras scii pri planedoj, satelitoj, kometoj...

- **NESCIADO:** temas pri la stato de iu, kiu ne scias ion.

La nesciado de solvo suferigas lin.

“El desconocimiento (el no saber) de una solución le hace sufrir”.

Pliaj dirindaĵoj pri la verbo *SCII*:

Ni troviĝas antaŭ transitiva verbo, tio estas, post ĝi aperas objekto sub akuzativa formo (-n).

- Mi scias esperanton

Tamen, ankaŭ povas aperi verbo:

- Mi ne scias naĝi.

Aŭ eĉ alia frazo:

- Mi scias, ke miaj gepatroj venos en mian hejmon morgaŭ vespere.
- Mi scias kiom da problemoj vi havas.

SCII + Ĉu

En la hispana lingvo ni diras.... *No sé si tú....*. Tamen, en esperanto tiu SI ne estas tradukebla per la esperanta SE, ĉar ne temas pri kondicionala frazo. Do, ni uzos ĉu.

- *Mi ne scias, ĉu ŝi venos.*
“No sé si ella vendrá”
- *Estas grave scii ĉu vi povos aĉeti la libron morgaŭ.*
“Es importante saber si podrás comprar el libro mañana”.
- *Vi ne povas scii ĉu morgaŭ pluvos aŭ ne.*
“Tú no puedes saber si mañana lloverá o no”.



Je la servo de la disvastigo de Esperanto en Andaluzio kaj de la Andaluzia Kulturo en la tuta mondo pere de komunikilo vere internacia.

Turismi en ... ALCAUDETE (Jaeno)

En la sud-oriento de la jaena provinco, meze de la Suda Jaena Montaro, troviĝas vilaĝo kiu ricevis el la araboj la nomon *l-Qabdäq* “La urbo de la de fontoj”, temas pri la nuntempa Alcaudete (*prononcu: Alkaudéte*).

Malgraŭ la fakto, ke ezistas pli antaŭaj restaĵoj, la vilaĝo havas romian originon, ĝi aperas sur antikvaj tekstoj kun la nomo *Unditunum*. En la jaro 715 la araboj konkeris la urbon kaj donis al ĝi la jam diritan nomon pro la abundo de fontoj tie ekzistantaj, li ankaŭ starigis turon por defendi la urbon. En 1085 la kastilia reĝo Alfonso la 6-a konkeris la vilaĝon kun la helpo de la fama kavaliro Rodrigo Díaz de Vivar, kvankam poste la araboj denove rekonkeris ĝin. En la jaro 1225 la kastila reĝo Ferdinando la 3-a konkeris Alcaudete, tamen li donacis la lokon al la araba reĝo de Baezo *al-Bazyyasi*, kiu estis aliancano de la kastilia reĝo. Definitive en la jaro 1340 la kastilia reĝo Alfonso la 11-a konkeris la urbon por la kastilia regnolando.



Blazono de
ALCAUDETE

De la jarcento 16-a ĝis la 18-a Alcaudete estis riĉa vilaĝo kie abundis cerealoj kaj bruto-bredado, krome ĝi starigis ĉe strategia loko en la vojo inter Kastilio kaj Granada. Komence de la 19-a jarcento Alcaudete estis tre luktema vilaĝo kontraŭ la napoleona armeo kaj poste tie triumfis la liberalaj ideoj, en la jaro 1836 eĉ okazis tie batalo inter la konservativaj trupoj de la karlista ĝeneralo Gomez kaj la liberalaj de Alaix. Meze de la 19-a jarcento ĥolera epidemio malpliigis tragike la nombron da enloĝantoj.

Dum tiuj jaroj la oliv-arbaro fariĝis la ĉefa ekonomia rimedo de Alcaudete. Jam en la 20-a jarcento la civila milito estis speciale terura en ĉi tiu vilaĝo kiu suferis perfortojn de unu kaj alia armeo. Alcaudete nun estas laborema vilaĝo kies ĉefaj rimedoj estas la oliv-arbaro kvankam ankaŭ ekzistas grava industrio pri ellaborado de dolĉaĵoj tre famaj dum la Kristnasko.

Monumentoj

La Kastelo de Alcaudete

La kastelo de Alcaudete estis parto de impona fortreso starigita de la islamanoj dum la 11-a kaj 12-a jarcentoj. Turojn kaj muregojn de la kastelo oni rekonstruis post la kastilia konkero en la jaro 1246. Elstariĝas la impona ĉefturo videbla el ĉiuj punktoj de la vilaĝo.



Preĝejo de Sankta Maria

Laŭdire oni konstruis la ĉefan preĝejon de la vilaĝo sur la loko kie stariĝis la islama moskeo. Ene de ĝi videblas gotikaj elementoj, kiel la volbo kaj ankaŭ aliaj renasencaj, kiel la ĉefa kapelo kies konstruanto estis Francisco del Castillo. Dum la 17-a jarcento oni aldonis la sonoril-turon.



Preĝejo de Sankta Maria en Alcaudete (Jaeno)

Fonto de la vilaĝo

Ĝi lokiĝas meze de la vilaĝo. Alcaudete estas urbo kie la fontoj abundis kaj jen la origino mem de ties nomo. Ĉar ĉi tiu fonto estas ĝuste en la centro de la urbo sendube ĝi estis la plej uzata de la vilaĝanoj. En la jaro 1775 oni rekonstruis ĝin, la akvo fluas dum la tuta jaro kaj pro la pureco de la akvo ĝi ankoraŭ estas uzata de la enloĝantaro.

Festoj

La Kalatravaj Festoj

Alcaudete, kaj la tutaj apudajn vilaĝojn de la sudo de la provinco Jaeno, ricevis kiel donacon la Milita Ordino de Kalatravo fare de la kastilia reĝo. Por memori tiun epokon, meze de la monato julio okazas la Festoj de Kalatrava, tiam oni memoras la luktojn inter islamanoj kaj kristanoj por posedi la urbon.



Soldatoj de la Kalatrava Ordino luktas kontraŭ la islamanoj dum la festoj.

Gastronomio

La oliv-oleo kaj la horto-produktoj estas la bazo de la gastronomio en Alcaudete. Tomatoj, faboj, kapsikoj estas ege bongustaj. Kaj rilate fruktojn figoj kaj prunoj, ĉu naturaj ĉu konservaj, estas gustuma plezuro. La artiŝokoj laŭ la stilo de Alcaudete estas famegaj. Vidu kiel oni ellaboras ĉi tiun recepton sur la paĝo 39-a.

Tamen, vere Alcaudete estas fama en la tuta mondo pro ĝiaj dolĉaĵoj, kiuj sendube devenas el la arabaj tempoj. La *hojaldrina*, (pron. *Ohaldrína*) ellaboritaj en la urbo, estas manĝataj en la tuta Hispanio dum la Kristnasko dank'al la fama industria firmao kiu ellaboras ĝin. Temas pri kristnaska dolĉaĵo ellaborita de tritik-faruno, graso, sukero, oranĝo kaj vino.



Hoyaldrina de Alcaudete

*Venont-numere TURISMI EN ...
CAMPILLOS (Malago)*

Ĉu Vi deziras kunlabori kun la revuo?

Ne hezitu sendi Viajn kunlaboraĵojn: artikolojn, desegnaĵojn, informojn, ludojn....

Gazeto Andaluzia estas la plej veterana esperanto-publikigaĵo en Andaluzio, tamen ĝi fariĝas tagon post tago kaj Via kunlaborado estas nepra.

Kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Antonio Ferrera Comesaña

La lasta sevila bohemano

Oni povas karakterizi la kulturen vivon en Sevilo dum la 7-a jardeko de la pasinta jarcento, kiel la tempon kiam reaperis politikaj ideoj bazitaj sur la socialismo kaj la andaluzismo kaj tio, malgraŭ la sufokanta politika etoso de la tiama frankisma reĝimo en Hispanio. En Sevilo ankaŭ okazis muzika renovigo, bazita sur la tradicia flamenko, kiu naskis tiun novan muzikan stilon konata kiel la “andaluzia roko”. Okazis samtempe la eltrovo de tiuj andaluziaj poetoj kie mortis fore de siaj hejmoj en la ekzilo, kiel Antonio Machado.



Antonio Ferrera Comesaña
1918 - 2002

Estis tempo kaj urbo kie floris la bohemianoj, kiuj renkontiĝis en konataj trinkejoj kaj dank'al ĉi ĉio renaskiĝis la kulturo en Andaluzio kaj pro tio ni nun devas esti fieraj.

Unu el tiuj ĉefroluloj de la kultura vivo en Sevilo dum tiuj jaroj, miksiĝo de bohemiano kaj luktanto por la sociaj rajtoj de la handicapuloj, estis Antonio Ferrera Comesaña. Li naskiĝis en Sevilo en la jaro 1918. Lia patro estis anarkisma ĉarpentisto kiu laboris en la konstruo de la impona Placo de Hispanio dum la Iberoamerika Ekspozicio de la jaro 1929, el li Antonio ricevis ribeleman karakteron kaj amon al ĉio rilata al la kulturo. Lia patrino laboris kiel kelnerino en milita kazerno, el ŝi ricevis pieman influon.

Jun-aĝe Antonio Ferrera enamiĝis al libroj, lia revo, laŭ li mem deklaris, estis fariĝi instruisto, bibliotekisto aŭ arkivisto. Tamen, post du-jara ĉeesto al mez-lernejo la armeo mobilizis lin dum la hispana civila milito. Li revenis sen-vundite el la kruela batalo de la rivero Ebro en la jaro 1938, tamen li malsaniĝis tie pro skabio kaj tuberkulozo kaj tio paralizis liajn musklojn. Do, li devis uzi dum sia tuta vivo rul-seĝon, sed tio favoris la revenon al lia plej granda pasio: la legado de libroj.

Dum la milito la patro de Antonio Ferrera mortis kaj lia patrino, suspektita kiel edzino de anarkisto, devis ĉesi en sia laboro kiel kelnerino ĉe milita kazerno. Tamen komandanto de la naciisma armeo interesiĝis pri la situacio de tiu juna handikapita eks-soldato kaj tiel, post la fino de la milito kaj en rekorda tempo, li atingis la rajtigon starigi gazet-kioskon ĉe unu el la plej viglaj stratoj de Sevilo, la *Puerta de la Carne*, tie kie situis la ĉefa merkato de la urbo kaj tuj apud milita kazerno, hodiaŭ sidejo de la Provinca Registaro. Tiuj kiuj konis tiujn jarojn kaj zonojn asertas, ke Antonio Ferrera ĉiam restis en la kiosko kun libro en-mane.



Strat-angulo en la urbo Sevilo kie starigis la gazet-kiosko de Antonio Ferrera Comesaña

Sendube, unu el la libroj legitaj de Antonio Ferrera devis esti metodo de la internacia lingvo Esperanto, tiel en la 5-a jardeko li jam estis membro de Hispana Esperanto-Federacio.

Li ankaŭ sentis la neceson labori favore al la handikapuloj, kiel li mem estis, tiel en la jaro 1958 li fondis en Sevilo ANIC, la Nacian Asocion de Civilaj Handikapuloj kaj li sukcese antigis por ĉi tiu grupo la rajtigojn aranĝi la aŭtomobil-parkejojn en la grandaj urboj. Do, solviĝis granda problemo por homa grupo suferanta malfacilaĵojn por trovi taŭgan labor-postenon.



En la jaro 1976 Hispana Poŝt-Servo dediĉis specialan poŝtmarkon al ANIC, asocio fondita de Antonio Ferrera

El la ideologia vidpunkto Antonio Ferrera estis la rezulto de la miksiĝo de la anarkismo de sia patro kaj la religia piemo de sia patrino. Pro tio li neniam pardonis al ĝeneralo Franko pro lia kruela traktado al la venkitoj dum la civila milito kaj samtempe aliĝis al katolika fokolar-movado.

Okaze de renkontiĝo de tiu asocio en Sevilo, li konis al Pastora, vivdino de elstara ano de

la Administracio, kiu sentis kor-inklinon al Antonio. Ili vojaĝis kune tra la tuta Eŭropo, tiel ili vizitis Parizon, Romon kie li ĉeestis en la jaro la Internacian Kongreson de Civilaj Handikapuloj, Londonon kaj eĉ Moskvon. Pri ĉi tiu lasta urbo oni devas diri, ke en tiuj jaroj ne ekzistis rilatoj inter la frankisma Hispanio kaj Sovet-unuiĝo, do ne oftis vizitoj de hispanoj al Rusio. Krome, estas necese memori, ke ne estus facila afero por handikapito sur rul-seĝo vojaĝi tra la tuta Eŭropo en tiuj jaroj. Kompreneble, oni povas imagi, ke dum unu aŭ kelkaj el tiuj vojaĝoj li uzus Esperanton kiel komunikilon.

En la jaro 1964 li vojaĝis al Francio kaj li vizitis la vilaĝon *Colliure*, tie kie estis entombigita la sevila poeto Antonio Machado dum la lastaj tagoj de la hispana civila milito. Post sia reveno en Sevilon Antonio Ferrera proponis al kelkaj sevilaj intelektuloj fondi asocion kies celo estus la revenigo de la korpo de Antonio Machado en Sevilon. Li mem kontaktis kun la hispana ambasadejo en Parizo kaj kun la franca konsulejo en Sevilo kaj fine, la Sevila Urbodomo mem

akceptis la proponon peti la entombigon de la sevila poeto en la Panteono de Elstaraj Sevilanoj. Tio estis granda sukceso, eĉ se nur temis pri la akcepto de peto pro la fakto, ke dum tiuj jaroj ankoraŭ regis en Hispanio la frankisma reĝimo.

Antonio Ferrera estas la kreanto de literatura premio en Sevilo, ni vidu: la prestiĝa eldonejo *Planeta* en Barcelono fondis dum la 5-a jardeko elstaran premion omaĝe al la edzino de la posedanto de la eldonejo. Fine de tiu sama jardeko Antonio Ferrera deziras agi same kaj tiel, li kreis la poezian konkurson "Adela Comesaña", omaĝe al tiu piema kaj humila virino laboranta ĉe milita kazerno kiu tutcerte neniam legis libron, tamen ŝi donis sian nomon al literatura konkurso. Komprenible, Antonio ne posedis, eĉ ne minimume, similajn ekonomiajn rimedojn al tiu de la kataluna eldonejo kaj pro tio, li provizis la premion per 1.000 ptoj (nuntempe 6 euroj) kaj manĝo en popola restoracio de la urbo. Sendube temis pri tre modesta ideo, tamen la konkurso sukcesis kaj grandaj aŭtoroj ĉeestis, ekzemple la poeto Ángel González, kiu poste eĉ atingis la Premion Princo de Asturio. Ankaŭ la ĵurianoj estis elstaraj, inter ili ekzemple la politikisto Alfonso Guerra aŭ la prestiĝa poeto Gabriel Celaya. Dum tiuj jaroj Antonio Ferrera ankaŭ korespondis kun konataj verkistoj, kiel Camilo José Cela, kiu poste atingis la Literaturan Nobel-Premion, Miguel Delibes aŭ Sánchez Ferlosio.

A B C. N.º 17.514. VIERNES 16 DE OCTUBRE DE 1935. EDICION

ANCHE SE FALLARON LOS PREMIOS LITERARIOS «PLANETA» Y «ADELA COMESAÑA», EN BARCELONA Y SEVILLA, RESPECTIVAMENTE

El primero fué otorgado a Andrés Bosch Yizalta y el segundo a Manuel Pérez Bonfill, ambos por unanimidad

Castillo Navarro, finalista

Barcelona 15. Esta noche se adjudicó, por primera vez en Barcelona, el Premio de Literatura Española "Planeta", instituido por el editor don Juan Manuel Lara, y otorgado a partir de este año, con doscientos mil pesetas.

El acto se ha desarrollado en los salones de un céntrico hotel, en un ambiente de expectación, en el curso de una brillante fiesta social, a la que asistieron personal-

izando, por lo tanto, catorce a la ronda final. De éstos, en cada votación se eliminaba a uno. El orden de eliminación fué el siguiente:

Tercero, "Punto de partida", de María Teresa Martínez de Acosta; segundo, "El otro", de Francisco Díaz Vellazquez; tercero, "La juventud es preciosa", de Enrique Viquele Izquierdo; cuarto, "La feria de Villacorta", de Juan Guadalupe Martín; quinto, "Rehabilitado incierto", de Marino Viveras; sexto. "Al otro lado del

Dum tiuj jaroj li ofte pasis multajn horojn en teo-salono "Nova Roma" en la centra parto de Sevilo kie li subtenis babil-rondon, ĉiam kun libro en-mane kaj verkante sur buŝ-tukojn de la salono. La malapero de la frankisma reĝimo en la jaro 1975 malfermis en Hispanio novajn eblojn por agadi politike. Antonio Ferrera aliĝis al andaluzisma movado kaj dum

La sevilaĵ ĵurnalaj informis samtempe pri la okazigo de la literaturaj premioj "Planeta" kaj "Adela Comesaña", malgraŭ la abisma diferenco inter ambaŭ.

tiuj jaroj li ade kontaktis kun la sevila intelektularo. En la jaro 1980 li verkis poeman libron sub la titolo “*Versos de Circunstancias*”, tiam li deklaris, ke la inspiron li atingis dank’al multnombraj vojaĝoj realigitaj kaj al kontaktoj kun aliaj kulturoj. En la jaro 1996 li verkis libron pri la vivo de Federico García Lorca, dum tiuj jaroj li ankaŭ kunlaboris kun sevilaj ĵurnaloj pro sia enciklopedia kono pri la plej kaŝitaj kaj nekonataj anguloj de la urbo.

Kiam en la jaro 2002 la sevilaj ĵurnaloj informis pri la morto de Antonio Ferrera Comesaña oni diris ke li estis “verkisto, poeto kaj bohemiano”. Jes, verŝajne la lasta sevila bohemano kaj ankaŭ esperantisto.

NO8DO

Sevilo



Historia Arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba ~ cordoba@esperanto.ac

ANDALUZIA KUIRARTO

Artiŝokoj laŭ la stilo de Alcaudete

Jen la ingredientoj por 4 homoj:



- 8 artiŝokoj.
- 400 gramoj da haketita viando.
- 4 ajleroj.
- Petroselo.
- Ovo.
- Nigra papriko.
- Paneroj.
- Blanka vino.
- Oliv-oleo
- Salo.
- Citrono.
- Akvo.

Jen la preparado:

1. Demetu la eksterajn foliojn el la artiŝoko kaj tranĉu la trunkon.
2. Per viaj manoj malfermu la internan parton de la artiŝoko, nomita koro, el la interna parto ĝis la ekstera. Atentu, faru ĉi tion tre zorgeme ĉar ĝi emas rompiĝi tre facile. Poluru ilin kaj demetu la malmolan parton el la trunko de la artiŝoko.
3. Metu ilin (artiŝoko kaj trunko), ene de bovlo plenita de akvo al kiu oni aldonis sufiĉe grandan kvanton da citron-suko. La citrono de la akvo evitos la nigriĝon de la legomo.
4. Sur alia loko ni preparos la farĉon. Miksigu la haketitan viandon kun petroselo, salo, nigra papriko, batita ovo kaj iomete da panero. Miksu la tutajon per viaj manoj.

5. Demetu la artiŝokojn el la bovlo, degutigu ilin. La farĉon el viando kaj ceteraĵoj ni enmetos en la internon de la artiŝoko. Farunu ilin.
6. Sur kaserolo verŝu iomete da oliv-oleo. Friktu dum kelkaj sekundoj la artiŝokoj kaj baldaŭ demetu ilin el la kaserolo.
7. Sur tiu sama kaserolo, do sen aldoni pli da oliv-oleo, tranĉu la ajlerojn. Kiam ili estos rostitaj verŝu la blankan vinon. Kiam ĝi vaporigos, metu la artiŝokojn, aldonu ankaŭ la trunkojn.
8. Fine verŝu akvon kaj atendu ĝis kiam la artiŝokoj moliĝos kaj estos eble vidi farunan saŭcon ĉirkaŭ ili. Aldonu salon se necese.
9. Bonan apetiton !!!

Ĉi-recepta vortaro:



Artiŝoko



Ajleroj



Oliv-oleo

Pano



Panero



Salo



Petroselo



Citrono



Nigra Papriko



Faruno



Kaserolo



Bovlo

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La strangaj lumoj de Guadix

La pasintan 8-an de februaro 2019 mistero okazis en la vilaĝo Guadix, granada provinco, kelkaj iluminaĵoj aperis en la ĉielo. Komence aperis nur 3, tamen poste atestantoj parolas pri la ekzisto de eĉ 10 strangaj lumoj trairente la ĉielon super ĉi tiu granada vilaĝo. Tiuj lumoj fine faliĝis sur la vilaĝon kaj unu el tiuj objektoj iris ĝuste kontraŭ tegmenton de senhoma domo.

Sed kio estis reale tiuj strangaj lumoj? Unuamomente, oni parolis pri meteoritoj, ankaŭ pri atmosfera glaciaĵo kaj eĉ pri restaĵoj de spaco-ŝipo. Tamen fine, prestiĝa astronomo asertis, ke tiuj okazintaĵoj nur povis ŝuldiĝi al afero nomita “globa fulmo”. Ĝi estas meteorologia fenomeno, kiu aperas en formo de moviĝanta kaj lumanta globo kun diametro de kelkaj centimetroj. Temas pri malofta fenomeno kaj ĝi aperas proksime al la tera surfaco dum fulmotondro. La globaj fulmoj esas videblaj nur dum kelkaj sekundoj kaj poste abrupte malaperas. Tiu malapero povas okazi mallaŭte aŭ eksplodsimile.



La stranga lumo finfine faliĝis kontraŭ tegmento de domo.

Aliuloj dubas pri tiu teorio, ili asertas, ke se oni parolas pri fulmo devus aperi brul-restaĵoj. Krome dum 3 tagoj post la okazintaĵoj

la informon oni ne diskonigis, kaj dum tiu tempo kelkaj homoj supreniris en la tegmenton kaj ili povus demeti kelkan restaĵon, oni diras, ke se temas pri meteorito tiuj restaĵoj estas altvalore pagitaj.

Alia substrekenda afero estas la fakto, ke ĉi tiu fenomeno ne okazas unuafoje en Guadix. Dum la 9-a jardeko de la pasinta jarcento, alia enloĝanto de la vilaĝo suferis fulman maŝargon kiu similis al vento-kirlo kaj kvankam li ne mortis li suferis gravajn vundaĵojn.

Kompreneble oni parolis ankaŭ pri NIFOJ kaj al la vilaĝo iris ĵurnalistoj kaj TV-programoj realigis specialajn programojn pri la okazintaĵo. Tamen ĉi-foje la mistero ŝajnas havi sciencan kaj facilan solvon.

GRAVA SCIIGO:

Nia elektronika adreso *esperanto14@ono.com* jam ne plu validas.


Ekde nun, Vi devas uzi alian adreson por kontakti kun nia revuo,
jen ĝi:

cordoba@esperanto.ac

aeu

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Nuda Krucvortenigo




HORIZONTALA

- A. En la aŭtomobiloj de la insularo Malto.
- B. Cifero.
- C. Akuzative, fortika ŝnuro.
- Ĉ. Plurale, tio, kio diras, kion oni faru en difinita okazo.
- D. Inverse kaj akuzative, unu el la ŝakfiguroj.
- E. Sen la lasta vokalo, daŭro de unu kompleta rondiro de Tero ĉirkaŭ Suno.
- F. En la germanaj aŭtomobiloj.


VERTIKALE

1. Se ni parolas pri matematiko, jen la radiuso de cirklo
2. Sen la lasta vokalo, rivero en Siberio.
3. Plurale, stangeto kiun oni pafas per arko.
4. Sen la lasta vokalo, ago de iu kiu daŭre taksas kaj difinas la grandecon de io komparante ĝin kun unu samspeca granda.
5. Sen la lasta vokalo, surfaca brilo ricevita per frotado.
6. Sen la lasta vokalo, mallonga klarigo aŭ rimarko ĉe loko de libro.
7. En la japanaj aŭtomobiloj.

Rebuso

- Kion li atingis en la konkurso?

Solvo al la pasintnumera Nuda Krucvortenigmo.



Solvo al la pasintnumera Rebuso.

- *Ĉi tio estas necesa por tiuj kiuj deziras bone prelegi:*
ELOKVENTO

Sur la bildo aperis cifero ok el kiu eliras blovo da vento.

Do *El ok vento ... Elokvento.*

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?

Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?

Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

cordoba@esperanto.ac



HUMURO



La numero 112-a de nia revuo aperos okaze de la fino de la kuranta jaro 2019. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

cordoba@esperanto.ac

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Alejandro Burgos Escalante
Juan García del Río
Juan Díaz Casado
Carlos Spinola

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
cordoba@esperanto.ac

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
www.esperanto-andalucia.info

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

79^a

HISPANA
ESPERANTO-
KONGRESO

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



Comillas
Kantabrio
2020

de la 30a de aprilo
ĝis la 4a de majo